

ASOCIAJ EKZAMENOJ

estas organizataj de la ekzamena komisiono de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, regule en aprilo, eksterordinare ankaŭ aŭtune. La loko de la ekzamenoj ne estas fiksita kaj ŝanĝiĝas.

Celo de la ekzamenoj pri Esperanto estas instigi kandidatojn pli profunde studi la lingvon kaj prepari sin por ĉiuseca praktika uzado de la lingvo, eventuale por ĝia uzado ĉe certaj fakoj. Atesto pri la farita ekzameno estas dokumento pri atingo de certa grado de scioj pri Esperanto kaj kapablo uzadi ĝin. Valideco de la atesto ekster ĈEA, ekzemple ĉe la ŝtataj organoj kaj aliaj organizaĵoj enlandaj kaj eksterlandaj estas reguligata per reciprokaj kontraktoj inter ĈEA kaj koncernaj organoj kaj organizoj.

La ekzameno ekzistas en du niveloj:

- a) mezgrada: pri scio de Esperanto
- b) supera: pri kapablo instrui Esperanton

Metodikaj instrukcioj por la ekzameno pri scio de Esperanto:

Skriba parto daŭras proksimume unu horon, konsistas el 3 partoj, eblas uzi vortaron:

- a) traduko de kontinua Esperanta artikolo (10-15 linioj) en la ĉeĥan
- b) traduko de 10-15 ĉeĥaj frazoj kun diversaj gramatikaĵoj en Esperanton
- c) skribo de memstara konciza stilaĵo pri unu el 3 proponitaj temoj

Parola parto daŭras 45 minutojn kaj konsistas el 3 partoj:

- a) aŭskulto de 3/5-minuta flue legata Esperanta teksto kaj konciza referado pri ĝi
- b) Esperantlingva konversacio pri diversaj temoj kun la ekzamenanto
- c) memstara rakontado pri la enhavo de unu libro en Esperanto, elektita el 4 libroj, kiujn la kandidato tralegis (4 tralegitaj libroj estas minimumo por la ekzameno)

Metodikaj instrukcioj por la ekzameno pri kapablo instrui Esperanton:

Necesas havi ateston pri sukcese farita ekzameno pri scio de Esperanto. Plue abiturientan ateston pri la ĉeĥa lingvo. Kiu ne havas ĝin, estos ekzamenata ankaŭ pri la ĉeĥa.

Hejma preparo:

1. Skriba stilaĵo (4-8 paĝoj A4) laŭ unu el 3 proponitaj temoj - necesas forsendi minimume 20 tagojn antaŭ la dato de la ekzameno.
2. Listo de Esperantaj libroj, kiujn la kandidato tralegis, minimume 8, unu el la klasika periodo (ekz. Zamenhof, Kabe, Grabowski), unu el la intermilita periodo (ekz. Kalocsay, Baghy, Schwartz), unu de la ĉeĥa aŭ slovakaj aŭtoroj aŭ tradukinto, ceteraj laŭ propra elekto (eblas envicigi librojn el la mezgrada ekzameno)
3. Skriba preparo de unu instruho (leciono) de Esperanto pri la instruaĵo laŭ proponitaj temoj (ekz. prepozicio "da", aĉetado - transitiveco de verboj, vetero)

Skriba ekzameno antaŭ la komisiono daŭras unu horon:

1. Traduko de 10-15 ĉeĥaj frazoj kun diversaj gramatikaĵoj en Esperanton
2. Traduko de kontinua ĉeĥa teksto en Esperanton (10-15 linioj)
3. Korekto de eraroj en Esperanta teksto (10-15 linioj)

Parola ekzameno daŭras 60-90 minutojn:

1. Analizo de la tekstoj el la skriba ekzameno laŭ vidpunkto gramatika, vorskpa, vortkrea, stila ktp. La kandidato devas ne nur praktike uzi la gramatikajn regulojn, sed ankaŭ ekspliki al supozataj lernantoj.

2. Referaĵo kaj diskuto pri iu el la tralegitaj libroj kaj diskuto pri la historio kaj literaturo de Esperanto

3. Pritraktoj el la pedagogia minimumo (ĝenerala psikologio, pedagogio, didaktiko, teorio de instruado, metodiko de Esperanto-instruado)

Pedagogio: homa perceptado kaj pensado, logiko kaj analogio, lerno kaj memoro, komunikado kaj parolo, sentoj kaj humoroj, volo kaj kutimoj, terperamento kaj karaktero, didaktikaj principoj, demonstro kaj praktiko, strukturo kaj tipoj de instruhoroj.

Metodiko de E-instruado: formoj kaj organizoj, metodoj, motivoj kaj motivigoj, planoj kaj dokumentado, strukturo de instruado, preparo de instruisto, lernolibroj kaj ilia uzo, instruado de gramatiko, de leksika materialo, de konversacio kaj flua esprimado, de literaturo, ekzercado kaj ripetado, ekzameno kaj klasifiko, notkajeroj, instruhelpiloj, kantoj, ludoj, konkursoj, informoj pri la movado, konduto de instruisto.

4. Praktika montro de instruado laŭ skribita hejma preparo (la lernantojn rolas la ekzamena komisiono)

Ekzameno pri la ĉeĥa daŭras 45 minutojn:

1. Diktaĵo (10-20 linioj)

2. Analizo de 1-3 frazoj laŭ vidpunkto vorskpa, sintaksa kaj gramatika

3. Libera stilaĵo pri unu el 3 proponitaj temoj

Literaturo kaj fontoj por studoj:

Por lerni la lingvon:

V.Barandovská: Esperanto pro samouky

J.Cink: Cviĉebnice esperanto pro pokroĉilé

W.Auld: Paŝoj al plena posedo

V.Němec: Ni parolas Esperante (konversaciaj temoj)

Pri la strukturo de Esperanto:

M. Malovec: Gramatiko de Esperanto

J. Kožený: Gramatiko de Esperanto

H. Seppik: La tuta Esperanto

Plena gramatiko de Esperanto

Plena analiza gramatiko de Esperanto

L. L. Zamenhof: Fundamento de Esperanto

L. L. Zamenhof: Lingvaj respondoj kaj opinioj pri Esperanto

Plena vortaro de Esperanto

Plena ilustrita vortaro de Esperanto

Pri historio kaj literaturo de Esperanto:

J. Vondroušek: Historie a spisovatelé

O. Kníchal: Světadíl bez tlumočnicků

S. Kamaryt: Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio E. Privat: Vivo de Zamenhof

E. Drezen: Historio de la mondlingvo

E. Drezen: Analiza historio de la Esperanto-movado
Enciklopedio de Esperanto

I. Lapenna: Esperanto en perspektivo
V. Novobilský: Skizo pri Esperanta literaturo
W. Benczik: Baza literatura krestomatia
A. Pechan: Gvidlibro por supera ekzamaeno

Pri pedagogio kaj metodiko de instruado:
R. Rakuša: Metodiko de la Esperanto - instruado
I. Szerdahelyi: La lerneja instruado de la internacia lingvo
I. Szerdahelyi: Metodologio de Esperanto
I. Szanser: Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado
J.Hendrich: Didaktika cizích jazyků

